

**1**(189)
**2023**

# Apudvistula Bulteno

**de Krakova Societo ESPERANTO**

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Wisława Szymborska

**Wszelki wypadek, 1972**

## Wrażenia z teatru

Najważniejszy w tragedii jest dla mnie akt szósty:
zmartwychwstanie z pobojowisk sceny,
poprawianie peruk, szatek,
wyrywanie noża z piersi,
zdejmowanie pętli z szyi,
ustawianie się w rzędzie pomiędzy żywymi
twarzą do publiczności.

Ukłony pojedyncze i zbiorowe:
biała dłoń na ranie serca,
dyganie samobójczyni,
kiwanie ścietej głowy.

Ukłony parzyste:
wściekłość podaje ramię łagodności,
ofiara patrzy błogo w oczy kata,
buntownik bez urazy stąpa przy boku tyrana.

Deptanie wieczności noskiem złotego trzewiczka.
Rozpędzanie morałów rondem kapelusza.
Niepoprawna gotowość rozpoczęcia od jutra na nowo.
Wejście gęsiego zmarłych dużo wcześniej,
bo w akcie trzecim, czwartym oraz pomiędzy aktami.
Cudowny powrót zaginionych bez wieści.

Myśl, że za kulisami czekali cierpliwie,
nie zdejmując kostiumu, nie zmywając szminki,
wzrusza mnie bardziej niż tyrady tragedii.

Ale naprawdę podniosłe jest opadanie kurtyny
i to, co widać jeszcze w niskiej szparze:
tu oto jedna ręka po kwiat spiesznie sięga,
tam druga chwyta upuszczony miecz.
Dopiero wtedy trecia, niewidzialna,
spełnia swoją powinność:
ściska mnie za gardło.

tradukis Adam Łomnicki

el poemaro **Mi inventas la mondon, 2015**

## Impresoj el teatro

Plej gravas en tragedi' por mi akto sesa:
releviĝo el batalkampoj de scenejo,
ordigado de perukoj, vestoj,
elŝirado de tranĉil' el brusto,
forprenado de maŝ' de la kolo
stariĝado el vico inter la vivantaj
vizaĝo publiken.

Kliniĝoj unuopaj kaj kolektivaj:
blanka man' sur vundo de koro,
riverencado de memmortigintino,
salutoj per detranĉita kapo.

Kliniĝoj duopaj:
furiozeco brakumas kvietecon,
viktimo beate rigardas la ekzekutiston,
ribelanto sen rankoro paŝaa ĉe tirano.

Tretado de eterneco per ora ŝueto.
Dispelado de moralaĵoj per ĉapelrandaĵo.
Strange optimisma preteco eki morgaŭ ankoraŭfoje.
Eniro anservice de mortintaj jam antaŭe,
ĉar en akt' tria, kvara kaj inter la aktoj.
Mirakla reveno de perditoj sen scio.

Pens', ke post kulisoj ili atendis pacience,
ne demetante kostumojn, ne forviŝante ŝminkon,
min kortuŝas pli ol grandvoĉoj de tragedio.

Sed vere grandioza estas kurtenfalado
kaj tio, kion oni vidas en fendo:
tie ĉi unu mano floron rapidkaptas,
tie dua levas falitan glavon.
Nur tiam tria, nevidebla,
plenumas sian devon:
stringas mian gorĝon.

Sejmo kaj Senato RP decidis, ke al la jaro 2023 patronos jenaj elstaraj personoj:
Aleksander Fredro (230-a datreveno de la naskiĝo),
Mikołaj Kopernik (550-a datr. de la nask. kaj 480 datr. de la morto),
Wojciech Korfanty (150-a datr. de la nask.)
Jan Matejko (130-a datr. de la morto)
Maurycy Mochnacki (220-a datr. de la nask.)
Jerzy Nowosielski (100-a datr. de la nask.)
Aleksandra Piłsudska (60-a datr. de la morto)
Włodzimierz Przerwa-Tetmajer (100-a datr. de la morto)
Paweł Edmund Strzelecki (250 datr. de la nask.)
Wisława Szymborska (100-a datr. de la nask.)
Jadwiga Zamoyska (100-a datr. de la morto)

Krome la jaro 2023 estas dediĉita al memoro de varsoviaj geherooj agantaj en geto okaze de 80-a datreveno de la ribelo.

El ĉi tiu aro de meritplenaj patronoj ni elektis personojn ligitajn kun Krakovo kaj skize ni prezentas iliajn verkojn aŭ biografiojn. Ili estas nobelpremiitino, poetino Wisława Szymborska, pentristo kaj akademia instruisto Jan Matejko, pentristo kaj verkisto Włodzimierz Przerwa-Tetmajer, kiu okupiĝis ankaŭ pri politiko, nuntempa artpentristo kaj profesoro de Akademio de Belaj Artoj Jerzy Nowosielski.

Wisława Szymborska, **Legaĵoj superdevigaj**, Krakovo 1997

Walter Haas. **Najtingaloj en veluro kaj silko – el vivo de grandaj primadonoj**, trad. el germana Juliusz Kydryński

Ankoraŭ en XVI jarc. oni opiniis, ke en bonorda teatro virino rolanta kiel virino estus aperaĵo maledifa. [...] Sed jam en la jaro 1600 en Florenco dum solena premiero de Eŭridika elpaŝis en la titola rolo virino. Ĉi tiu skandalo eblis nur fore de la papa Romo, kie ankoraŭ longe virinoj veni sur scenejon ne povis. Kun tempopaso tiu roma malpermeso fariĝis pli kaj pli embarasiga, ĉar da operoj estis plimulte, bezono de bele kantantaj knaboj pligrandiĝis, kaj oferto estis malgranda kaj ĉiam minacis al ĝi neevitebla mutacio de la voĉo. Knabojn do oni komencis kastri. Kion oni faras por konservi bonajn morojn...

De tiam en roloj de eteraj nimfoj, diinoj kaj paŝtistinoj rolis enorme kreskitaj kaj grasigitaj invalidoj kun voĉoj superhome belaj. Komencis pri ili rivali ĉiuj operaj scenejoj de Eŭropo, eĉ tiuj sur kiuj virinoj estis jam bone hejmiĝintaj. Kastritoj estis por la febla sekso minaca konkuro, do kantistinoj ofte devis kontentigi per roloj de sentimentalaj amantoj. Ĉi tio fariĝadis situaciojn el kuriozaĵejo. En iu londona spektaklo elpaŝis tiom da kantistinoj en pantalonoj, kiom da eŭnukoj en krinolinoj. Aŭde ĉi tio povis esti eminenta, sed vide devis esti terura.

Kiam oni ĉesis finfine barbaran produktadon de kripluloj, virinoj havis okazon venĝi, ĉar transpreninte post kastritoj ĉiujn rolojn virinajn, retenis ankaŭ  la virajn. Sistemo fariĝis nun simila al la komenca, nur kontraŭa: al dormanta (opara jam) Desdemona ŝteiris Otelo, ŝi kun lipharoj. Tian ankoraŭ spektaklon rigardis Chopin en Parizo. Ĉar Otelo estis eta, kaj Desdemona kiel forno li timis, ke sufoko realiĝos en inversa direkto. Ĉiam mi lin admiris, ke ne lasis sin tenti al Mickiewicz por verki operojn. Probable li havis pli gravajn kaŭzojn por persisti ĉe fortepiano, sed kiu scias, ĉu ne rolis ĉi tie ankaŭ lia ega sento de komikeco: li anticipe scipovis antaŭvidi ĉiajn eblajn monstrecojn de roldistribuo, kiujn antaŭhaltigi li ne povus. Kaj jam anticipe li vidis sin, malfeliĉan aŭtoron, kuntiriĝintan en la plej malhela angulo de loĝio.

esperantigis *Lidia Ligęza*

## Jan Matejko

(24.06.1838 – 1.11.1893)

La plej elstara pola artpentristo historia; profesoro kaj direktoro en krakova Skolo de Belaj Artoj, zorganto pri krakovaj historiaj restaĵoj.

Li naskiĝis, kreis kaj mortis en Krakovo. Studadon en krakova Skolo de Belaj Artoj (1852 -58) li kompletigis en Munkeno kaj Vieno. De la jaro 1863 li direktoris en la sama krakova arta akademio. Liaj disĉiploj estis i.a. J. Malczewski , J. Mehoffer kaj S. Wyspiański. Kiel ano de multaj eksterlandaj akademioj li vojaĝis kelkfoje al Parizo kaj Vieno kaj ankaŭ al Turkio, Ĉeĥio, Hungario kaj Italio.

Matejko multe vojaĝis tra Pollando, kio krom studado de fontoj alportis kelkmilan aron de dokumentaj desegnaĵoj kaj publikaĵon "Vestoj en Pollando" (1860).

Li kolektis restaĵajn aĵojn, kiuj estis utiligataj ĉe la pentrado. Ek de 1862 j. li kreis vicon de egaj kaj malpli grandaj bildoj dediĉitaj al la patrolanda historio. Al plej gravaj apartenas komponaĵoj: Stańczyk (1862), Prediko de Skarga (1864), Rejtan (1866), Unio en Lublino (1869), Batory sub Psków (1872), Pendigo de sonorilo al Zygmunt (1874), Batalo sub Grunwald (1878), Omaĝo prusa (1882), Sobieski sub Vieno (1883), Vernyhora (1883), Kościuszko sub Racławice (1888), Trimaja Konstitucio (1891) kaj 12 bildoj el ciklo Historio de civilizo en Pollando (1889). Grandan popularecon gajnis ciklo de desegnaĵoj Anaro de reĝoj kaj princoj polaj (1890).

Bildoj de Matejko similas al monumentaj, panoramaj spektakloj, kies ĉefa eco estas granda ekspresio. Karakterizas ilin vigla, maltrankvila desegno, plastiko de personoj kaj koloroj komence brunaj, pli poste harmonie buntaj.

Gravan lokon en kreado de Matejko okupas portretoj. Ekzistas grupo de portretoj modestaj, malhelkoloraj, substrekantaj vizaĝesprimon kiel ekz. Memportreto (1892) kaj grupo de portretoj pompaj, riĉaj, klarkoloraj ankaŭ profunde karakterizantaj modelon; al ĝi apartenas ekz.: Portreto de edzino en nupta robo (1879) kaj Porteto de S. Tarnowski (1890).

Signifanta kreaĵo de Jan Matejko estas ankaŭ monumenta polikromio en preĝejo al Sankta Maria (1889 – 91).

Arto de Jan Matejko, pli emocia ol malvarma, akademia historia pentroarto eŭropa plaĉis al vastaj, sociaj tavoloj. Omaĝe, sur Vavelo, 29. 10. 1878 j. oni enmanigis al li sceptron por signi lian regon en arto.

Dum tuta vivo Matejko zorgis pri historiaj restaĵoj, partoprenis en renovigo de Draphaloj kaj Maria Preĝejo, estis ano de komitato okupiĝanta pri rekonstruo de Vavelo.

Pentroarto de Jan Matejko ege rolis en plifortigo de la nacia konscio inter socio.

## Włodzimierz Przerwa-Tetmajer

(31.12.1861 – 26.12.1923)

Modernisma artpentristo inspirita de subkrakova kaj montarana folkloroj, verkisto kaj politikisto.

Lia artista eduko disvolviĝis apoge de krakova Skolo de Belaj Artoj, Akademiaj de Belaj Artoj en Vieno kaj Munkeno. Studadon li kompletigis en pariza Académie Colarossi kaj en Romo. Samtempe li finis klasikan filologion en Jagelona Universitato. Li apartenis i.a. al Societo de Polaj Artistoj "Arto".

En subkrakova vilaĝo Bronowice Włodzimierz ekkonis deksepjaran Annan, la ple aĝan el tri filinoj de Jacenty el fama loka gento Mikołajczyk. Nupto de Anna kaj Włodzimierz okazis 11.08.1890 j. en krakova preĝejo al Sankta Maria. Ili ekloĝis en Bronowice; ilia modesta domo fariĝis salono arta – literatura.

La plej fama modernisma dramo de Stanisław Wyspiański "Nupto", kies heroojn la aŭtoro apogis je aŭtentaj personoj, prezentas menciitan geedzparon kiel Mastrinon kaj Mastron.

Włodzimierz estis la pli aĝa duonfrato de fama poeto Kazimierz. La fratojn ligis malfacilaj, ne ĉiam favoraj rilatoj pro familiaj aferoj.

Kiel artpentristo Włodzimierz ĉefe okupiĝis pri stabla pentroarto kaj polikromio. Li pentris bildojn montrantajn subkrakovan vilaĝon, laboron de kamparanoj kaj tradiciajn festojn kaj kutimojn. Pli grandan agnoskon ol bildoj gajnis polikromioj, kiuj troviĝas en multaj polaj preĝejoj inter alie en Sosnowiec, Kalisz, Biecz, Wieliczka. La plej konatan oni povas rigardi en vavela kapelo al reĝino Zofia. Ankaŭ konata kaj bone taksata estas polikromio en krakova restoracio "Hawełka". Al fama ara verko "Panoramo de Racławice" Tetmajer alpentris certajn figurojn de kamparanoj kaj ĝenrajn scenetojn.

Ne tro abunda lia porliteratura agado ampleksas i.a. prozan volumon "Someraj noktoj", poemon "Racławice", poemvolumon "Destino", dramon "Piasto" kaj vortaron s.t. "Vortaro. Kolekto de esprimoj kaj vortoj uzataj en Bronowice sub Krakovo".

Tetmajer estis aktiva, iredenta politika aganto. Li apartenis al Pola Popola Partio kaj oni elektis lin al viena parlamento. Kiel konata artpentristo li povis efike agi en politiko. Liaj porpolitikaj okupoj multe malhelpis al li en la arta kreado.

prilaboris *Grażyna Porada*

## Jerzy Nowosielski

(7.01.1923 – 21. 02.2011)

Unu el la plej elstaraj polaj artistoj de la dua duono de la 20-a jarcento. Pentristo, desegnisto, scenaranĝisto, filozofo kaj ortodoksa teologo.

En 1940 li komencis sian studadon en la germana dummilita Ŝtata Lernejo pri Metiartoj en Krakovo (Staatliche Kunstgewerbeschule Krakau) sub la gvidado de prof. Stanisław Kamocki. Inter la jaroj 1942 kaj 1943 li studis ikonpentradon en la lavro (monaĥejo) de Johano Baptisto en Uniów apud Lvovo. Reveninte al Krakovo, li kunligiĝis kun la artista rondo, kiu poste adoptis la nomon „Krakova Grupo". Dum la jaroj 1945–1947, li studis en Akademio de Belartoj en Krakovo sub prof. Eugeniusz Eibisch. Dum la Ekspozicio de Moderna Arto en Krakovo, kiu okazis en 1948, li unuafoje prezentis siajn pentraĵojn en la stilo de geometria abstraktismo. En la unua periodo de sia artista vojo, li estis helpanto de Tadeusz Kantor, restante sub la influo de Tadeusz Brzozowski. Dum la tempo de socialisma realismo li okupiĝis pri sakrala arto kaj scenaranĝado. Lia unua individua ekspozicio okazis en 1955 kaj dum la venontaj kelkaj jaroj li reprezentis Pollandon dum Venecia Bienalo 1956 kaj San-Paŭla Bienalo 1959.

Ekde 1976 li estis profesoro en la krakova Akademio de Belartoj kaj membro de Pola Akademio de Scipovoj, de Grupo de Junaj Plastikistoj kaj de Krakova Grupo. En 1996, kune kun sia edzino Zofia, li estigis Fondaĵon de Nowosielscy, kies celo estas subtenadi atingojn de la pola kulturo per disdonado de stipendioj kaj ĉiujaraj premioj. Jerzy Nowosielski mortis la 21-an de februaro 2011 en Krakovo kaj estis entombigita sur Tombejo Rakowicki en Krakovo.

La kreaĵoj de Nowosielski estas plate pentritaj formoj kun karakterizaj malhelaj konturoj. La ikonoj estas plej ofte prezentataj en pejzaĝoj kaj metafizikaj komponaĵoj. Aldone li kreis monumentajn murdekoraciojn, i.a. en ortodoksaj preĝejoj en Lourdes, Gródek kaj Kętrzyn. Inspiradis lin surrealismo, en siaj verkoj li penis interligi elementojn de du mondoj: la sakrala kaj la profana.

Laŭ la vortoj de la artisto mem: "Pentrado estas preparado de interna spaco en si mem, spacon en kiu ni devos vivi post la morto, ĝi estas konstruado de propra loĝejo. Se oni ne amas tion, kion oni pentras, oni nur perdas tempon".

surbaze de niezlasztuka.pl, esperantigis *Tymoteusz Smoliński*